

Kluba Bulteno

Organo de Klubo Esperantista en Oslo

N-ro 2 2010

Mardon la 23an de marto

58a jaro

EN LA JARKUNVENO lundon 1 marto ni ne povos finfari la elektojn pro manko de kandidatoj por kelkaj el la postenoj. Mankis ankaŭ elekta komisiono.

Kaj ni petis la kasiston fari modifojn al la jarkalkulon.

(Vidu la raporton sur p. 3.)

Por trakti tiujn aferojn la estraro jen kunvokas la membrojn al

PÅ ÅRSMØTET mandag 1. mars ble vi ikke ferdig med valgene, da det manglet kandidater til flere av vervene. Det manglet også valgkomité.

Dessuten ba vi kassereren gjøre noen endringer i oppsettet av regnskapet. (Se rapporten på s. 3.)

For å behandle disse sakene innkaller styret herved til

eksterordinara ĝenerala kunveno / generalforsamling lundon/ mandag la 19an de aprilo (semajno/ uke 16)

Aliaj aferoj por diskuto samvespere – post la formala ĝenerala kunveno

1. Kiajn membrokunvenoj ni aranĝu? Se ne venos pli da membroj ol lastatempe, ne valoras la penon prepari temojn aŭ prelegojn.

2. Kian alian – aleksteran – agadon ni povos plani?

3. Propono aranĝi antaŭ- aŭ postkongreson en Oslo venontjare lige kun la UK en Kopenhago (vd. p. 3)

Andre saker for diskusjon samme kveld – etter generalforsamlingen:

1. Hva slags medlemsmøter skal vi arrangere? Hvis det ikke kommer flere medlemmer enn det har gjort i det siste, er det ikke verdt å forberede foredrag eller temaer.

2. Hvilke andre (utadvendte) aktiviteter kan vi planlegge?

3. Forslag om å arrangere en før- eller etterkongress i Oslo til neste år i tilknytning til verdenskongressen i København (se s. 3).

OKAZIS

Lundon la 18an de januaro

La tre aktuala temo estis la frontpaĝo de la tiutaga *Aftenposten*. Ĝuste tiun tagon ĝi montriĝis sufiĉe sobra, kun ekvilibro inter en- kaj eksterlandaj raportoj. La titolon "*Bruker falske pass til nye forbrytelser*" ni unue tradukis laŭvorte, sed ni ankaŭ sukcesis esprimi la lastan parton per unu vorto en Esperanto*. Hazardecon de la gazetaj novaĵoj atestis tio ke la temo de la ĉefa artikolo en *Aftenposten* tute ne estis trovebla en *VG*!

Lundon la 1an de februaro

Ni ne antaŭanoncis temon por la kunveno, sed ni havis interesan interparolon kun nia gasto Peter Lohausen, fervojisto el Plauen en orienta Germanio. Li montris al ni bildojn de diversmaniere konstruitaj pontoj, novaj kaj malnovaj, en sia hejmrregiono Vogtland, ĉarma sed forkaŝita apud la ĉeĥa landlimo.

DD

* Per falsa pasporto plukrimis

Lundon la 15an de februaro.

La junuloj aranĝis sian pican kunvenon en Esperantonia por ĉiuj klubanoj.

David Welsh kantis tri popularajn anglajn kantojn, kiujn li tradukis en Esperanto.

Krome oni interparolis plejparte en Esperanto dum aŭdiĝis Esperantaj kantoj perkomputile. Venis pluraj membroj kiujn ni longe ne vidis.

KPH

Lundon la 1an de marto

Ĝenerala kunveno.
Vidu apartan raporton.

Lundon la 15an de marto

Ni interparolis pri la funkciado de UEA kaj la opinioj de ties prezidinto Humphrey Tonkin en lia libro *Lingvo kaj popolo*.

DD

Har du lagringsplass hjemme?

Vi gjentar: Vi har i kjelleren her boklageret fra Esperantoforlaget, nå overtatt av klubben vår. Mye av dette er ikke ting som behøver å ligge akkurat her. Hvis noen kunne lagre noen esker med bøker hjemme, ville det frigjøre plass som trengs til mer aktuelle ting (f.eks. deler av Forbundets bibliotek, som snart må flyttes fra magasinet i Hamar bibliotek). Si fra til kontoret hvis du tror du har mulighet for å hjelpe.

Jarkunveno lundo 1 marto 2010: el la protokolo

Jarraporto 2009: Ni aprobis la dissenditan jarraporton, kun diversaj korektetoj. Ni pretas sendi la korektitan version al petantoj. *Vi kan sende den rettede versjonen av årsmeldingen til dem som ber om det.*

Jarkalkulo 2009: La kasisto, Harald Rygg, prezentis la jarkalkulon. Ni petis lin modifi la kalkulon indikante la veran domluon, la specialan subvencion kiun NEL pagis en 2008 kaj 2009 el la mono de la malfondita Eldonejo kaj la kluban (60%) parton de la enspezoj pro luigo.

Kun tiu ŝanĝo ni aprobis la jarkalkulon, kondiĉe ke la revizoro ne havos rimarkigojn.

Elektaj. Elekta komisiono ne estis nomumita.

Ni faris la jenajn reelektajn:

Prez. Kjell Peder Hoff; vicprez.: Cato Haugen; unu el la du sekretarioj: Douglas Draper; (la alia: vakas) kasisto: Harald Rygg.

Por pluraj aliaj postenoj (la dua sekretario, anstataŭantoj de estraranoj, de revizoro kaj de reprezentanto en la domkomisiono) mankis kandidatoj. Tial la ĝisnuna estraro devos kunvoki eksterordinaran ĝeneralan kunvenon kaj intertempe trovi kandidatojn por la restantaj postenoj.

Ĉar ne eblis finfari la elektojn, la ĝisnunaj estraro kaj aliaj postenuloj devas funkcii plu ĝis la eksterordinara ĝenerala kunveno.

Ĉu antaŭ-/postkongreso en Oslo 2011?

De Dana E-Asocio, kiu planas Universalan Kongreson en Kopenhago venontjare, NEL ricevis proponon de antaŭ- aŭ postkongreso en Oslo. Kelkaj membroj reagis (tre) pozitive. Sed ĉu sufiĉe multaj por realismigi la projekton, aŭ ĉu ni riskas elĉerpi niajn fortojn kaj neglekti aliajn taskojn?

Fra det danske E-forbundet, som planegger verdenskongressen i København til neste år, har Forbundet vårt mottatt et forslag om at det arrangeres en før- eller etterkongress i Oslo. Enkelte medlemmer har reagert (svært) positivt. Men er de tilstrekkelig mange til projektet er realistisk, eller risikerer vi å slite oss ut på det og forsømme andre oppgaver?

Ĉu iu volas lui kunvenĉambron? Vil noen leie møterom?

(Vi spør igjen:) Kjenner du noen som kunne være interessert i å leie møterommet vårt for en eller flere kvelder? Brosjyre med nærmere opplysninger og bilder kan du få fra kontoret.

La klubo vendas librojn, insignojn, glumarkojn

Ekz-e la novan lernolibron de Stano Marĉek: *Esperanto – direkte metode* (danan), 95 kr, kaj la klasikan *Fenomenet Esperanto* (50,-) Aŭ la kolekton (2009) *Lingvaj paĝoj el Norvega Esperantisto* (175,-).

De Jon Rømmesmo (1923 – 2007) ni ankoraŭ havas *Om det internasjonale språket Esperanto* (2001) 48 p A5 37 kr.

Kaj abundan stokon de la *Ŝlosilo (Nøkkel til esperanto)* kaj (norsk-esperanto) *Ordliste*. La nova prezo por ili ambaŭ estas 10 kr (sed 20 kr por 3; 50 kr por 10).

Ni havas ankaŭ unu lastan ekz. de la brila nova biografio de Zamenhof, *Homarano*, pro kiu Aleksander Korĵenkov elektiĝis "Esperantisto de la jaro" 2009. Kaj multon pli. (Petu liston.)

La klubo vendas ankaŭ **ruĝajn glumarkojn** (4 x 7 cm), kun la teksto:

ESPERANTO det internasjonale språket –
nøytralt – fredsfremmede – lettlært – kontaktskapende – [kaj la retadreso].

por valizo, (dorso)sako, teko po 2 kronoj.

Kaj insignojn / *jakkemerker* (verda stelo).

Klubben selger lærebøker, ordbøker, lesebøker, "Nøkler", klistremerker m.m.

Kunvenejo ("Esperantonia") Olaf Schous vei 18 (enirejo en Schouterrassen) en Sinsen. Buso 31 aŭ tramo 17 al Rosenhoff kaj de tie iru supren laŭ Båhusveien; aŭ iru malsupren de Sinsen T (buso, metroo) aŭ de la haltejo Sinsenterrassen (tramo) laŭ la samnoma strato.

NI KUNVENAS la unuan kaj la trian lundojn de ĉiu monato, je la 19a horo. Tamen ne la paskan lundon.

Klubo Esperantista en Oslo, Olaf Schous vei 18, 0572 Oslo. Tlf. 22 35 08 94
www.esperanto.no/oslo Retpoŝto: <oficejo[a]esperanto.no>
Poŝtĝiro 0532 36 19699 (sed kotizon pagu al NEL/*Forbundet* 0533 05 22870).